

KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Izabella Ĝekson,
[K-URALSKIJ, Sverdl.ob.Rusio]

redakcie — pasporta servo — gramatiko kaj tempo — rimaro
vortluda konkurso — krucvortenigmo — anekdotoj — aforismoj
korespondu!

KOMENCANTO

1999 numero 2/ refundita en 1997/8 numeroj jare

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova

adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando

elektronika poŝto : let@post.e-burg.su

abontarifo por 1999:

internacia tarifo:

24 nederlandaj guldenoj aŭ \$12; orienteŭropa kaj

latinamerika tarifo: \$10; aŭ por ĉiuj — 15 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

ruslanda tarifo: 54 рубль

(за 8 номеров в год) простым почтовым

переводом на имя Кудрявцева Виктора

Васильевича: 620041, Екатеринбург, а. я. 132

PERANTOJ

de KOMENCANTO

laŭ ĉi-subaj adresoj vi povas aboni nian gazeton

AŬSTRALIO

Libroservo de AEA, P.O.Box 230 Matraville N.S.W.
2036.

ĈEĤIO

Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice

ESTONIO

Virve Ermits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

FRANCIO

Raoul G.Melo, 34, av de Russie,

F-03700, Bellerive s/Allier

ITALIO, KROATIO, SLOVENIO

Višnja Branković, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

POLLANDO

Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137,

PL-01-865 Warszawa

SVEDIO

SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE —

24294 Hörby

SVISLANDO

Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224

Nenzlingen

UKRAINIO

Dmitrij Cibulevskij, ab.skr. 9307, UA — 310003,

Ĥarkiv

USONO

Ionel ONET, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530

ĈINIO — vakas; BRAZILO — vakas

BRITIO — vakas; JAPANIO — vakas

NEDERLANDO — vakas;

redakcie

Karaj legantoj!

Jen la dua numero de 1999. La redakcio daŭre klopodas fari la revuon interesa, utila kaj amuza.

En tiu ĉi kajero vi trovos raporton pri PASPORTA SERVO — unika organizaĵo por vojaĝoj per Esperanto. La Servo vere estas interesa, tial ni decidis prezenti ĝin detale. La fino de la raporto atendas vin en la sekva kajero de "K"

Sur la gramatika paĝo ni daŭrigas rakonton pri la tempo, ekde tago ĝis erao.

Sur la kvina paĝo vin atendas nia nova iniciato. Nia fidela amiko Bill Thorne el Londono verkis RIMARON. Ni prezentas ĝin, donas kelkajn ekzemplojn kaj invitas vin partopreni en la verkado de poemetoj en la internacia lingvo. Tasko estas tre amuza kaj utila por pli bona ekposedo de Esperanto.

La sesa paĝo revènis nin al la dua numero de 1998. Tiam ni proponis por la legantoj provi verki pli-malpli sencohavan rakonton, kies ĉiuj vortoj komenciĝus je unu sama litero. Tiam ni havis sukceson. Ĉi jare venis multaj novaj abonantoj al nia familio kaj ni decidis ripeti la bonan eksperimenton.

La sepa paĝo estas pli-malpli tradicia, ni nur petas vin sendi al ni pli abunde *aforismojn*, oni povas preni ilin kie ajn kaj traduki. Kaj poste sendi al la redakcio de KOMENCANTO.

Pri la lasta paĝo. Ni prezentas detale INTERNACIAN KORESPONDAN ADRESARON.

Kiel ĉiam aktivas niaj pentristoj Izabella Ĝekson, Oksana Burkina, Sergeo Kostromin, Bill Thorne. Ni invitas vin pli aktive verki kaj pentri por KOMENCANTO!

GRAVAS! Ni ricevis konsentojn peri "K-n" el Usono kaj Francio!

DANKON!

al: — *Burt Titus*,

(Ventura CA, Usono) pro 8 \$ kiel donaco por "K"

— *Marjo van Bentum van den Broek*,

(Den Haag, Nederlando), pro 26 guldenoj kiel donaco por "K"

— *Martin Ginette*,

(Saulxures sur Moselotte, Francio),

pro 30 francaj frankoj kiel donaco por "K"

redakto-fino de "K"-3'99 la 15-a de aprilo

PASPORTA SERVO

Per tiu ĉi rakonto ni komencas nian serion pri praktika uzo de Esperanto por vojaĝoj. En la LISTO de Pasporta Servo-1998 troviĝas 871 adresoj el 75 landoj! Pasporta Servo estas unika ne nur en Esperantujo. Ŝajnas nenio simila estas praktikata ĉe aliaj organizaĵoj. La redakcio dekomence planis kompili propran rakonton pri ĝi, sed poste komprenis, ke la plej bona kaj plena rakonto estas en la LISTO mem. Tial ni senŝanĝe kopias ĝian tekston kaj atendas viajn demandojn. La fino de la rakonto pri PS aperos en la 3-a numero de KOMENCANTO kune kun prezento de la persona sperto de la redaktoro en tiu brila iniciato de TEJO. (Mi feliĉis dufoje uzi PS kun agrabla rezulto!) En la sekva numero de "K" ni respondos al viaj eventualaj demandoj.

Pasporta Servo estas unu el la plej konkretaj ekzemploj al la ekstera publiko ke Esperanto utilas kaj funkcias. Ĝi montras al homoj, ke Esperanto ne nur estas bona ideo, sed ke lernado de la lingvo estas profita kaj interesa, ĉar oni povas facile uzi la lingvon per malmultekosta vojaĝado. Ju pli granda Pasporta Servo, des pli efika la varbado kaj informado.

Kio estas Pasporta Servo?

Pasporta Servo estas servo de la Esperanto-movado por Esperanto-parolantoj. Ĝiaj membroj havas la eblon ricevi senpagan gastadon. Ĉiu kiu posedas la propran ekzempleron de la listo de gastigantoj estas membro kaj rajtas uzi sian liston por trovi gastigon. Membreco en Pasporta Servo ne estas ligita al iu ajn alia membreco.


Gastigado laŭ Pasporta Servo ne nepre estas luksa. Ĉiuj variantoj ekzistas, de surplanka dormosako ĝis la rajto de la utiligo de la tuta domo. La listo de Pasporta Servo estas eldonaĵo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). La unua ideo pri la tiel nomata "Programo Pasporto" estiĝis en 1966. Pasporta Servo laŭ la nuna sistemo aperis unufoje en 1974, kun 40 gastigantoj.

Kiel fariĝi membro?

Vi aĉetu la liston de la gastigantoj, kaj skribu vian nomon

sur la kovrilon. Nova listo estas regule eldonata, kaj ĉiu listo validas ĝis la sekva eldono. Se vi ne scias pri proksima libroservo aŭ klubo kiu povas vendi la liston al vi, rigardu sub *Centra Distribuanto*. Gastigantoj aŭtomate fariĝas membroj.

PS-1998: 871 adresoj el 75 landoj



Kiel fariĝi gastiganto?

Vi fariĝas gastiganto se vi plenigas kaj forsendas la aliĝilon. Aliĝiloj devas alveni ĉe la Kompila teamo (vidu poste) antaŭ la limdato indikita sur la aliĝilo por esti certa pri apero en la tuj sekva eldono de Pasporta Servo. Sendante la aliĝilon pli malfrue, vi riskas aperi en la eldono post la tuj sekva. Aliĝilo troviĝas en la listo, kaj haveblas de la landa Organizado aŭ la Centra Distribuanto.

Ĉiu kiu mem aperas en la listo kiel gastiganto ricevas propran ekzempleron senpage, kaj tiel fariĝas membro.

Kondiĉoj

Ĉiuj membroj de Pasporta servo (gastoj kaj gastigantoj) devas scii Esperanton. Tio estas la kialo ke ne aperas mencioj ke gastiganto parolas ankaŭ alia(j)n lingvo(j)n; tia mencio principe utilas nur se temas pri eventualaj neesperantistaj kunloĝantoj.

La listo estas persona kaj validas nur por vi mem. Vi ne rajtas pruntedoni vian liston al alia persono. Por ke la listo validu, ĝi devas havi vian nomon (la nomon de la posedanto) sur la fronta paĝo.

Konfirmo

Ĉiuj gastigantoj devas konfirmi sian mencion por la venonta eldono. Tio necesas por eviti malaktualajn adresojn, kondiĉojn aŭ informojn. Vi aŭtomate ricevas memorigilon kun respondilo ĉirkaŭ du monatojn antaŭ la limdato de la venonta eldono. Simple resendu la respondilon al la Kompila Teamo, kun eventualaj ŝanĝoj aŭ korektoj. Se vi ne ricevas memorigilon (ekzemple pro translokiĝo) vi povas konfirmi per aliĝilo. *Atentu!* Tiuj kiuj ne konfirmas antaŭ la limdato aŭtomate elfalos!

[daŭriĝo en la 3-a numero de "K"]

GRAMATIKO kaj TEMPO

TEMPO - universala kategorio de la homa spirito, en kiu ĝi ordigas la sinsekvajn fenomenojn, kaj kiu estas konceptata kiel senfine granda kaj senfine dividata




(PIV)

Hodiaŭ ni klarigas pli grandajn post *horoj* tempo-partojn aŭ tempo-unuojn ekde tagoj ĝis jarmiloj kaj eraoj. Vi certe scias tiujn vortojn, sed ni prezentas al vi iliajn vortarajn signifojn, do la plej ĝustajn. Tial, ke vi sciu ĝustajn signifojn de tiuj vortoj kaj uzu ilin korekte. Vi ekscios, ke mateno estas tempo inter la sunleviĝo kaj tagmezo, sed ne io alia...


TAGO

Tiu tempopeco, kiu pasas dum unu plena rotacio de la tero ĉirkaŭ sia akso.

— Spaco da tempo, dum kiu la sumo prilumas difinitan parton de la tero



NOKTO: tempo, dum kiu la suno estas sub la horizonto kaj ne prilumas



tagmezo: mezo de la tago; momento markita la 12-a horo

noktomezo: momento de la 24-a aŭ 0-a horo

mateno: parto de la tago ekde la sunleviĝo ĝis la tagmezo

vespero: la lasta parto de la tado, kiam la suno subiras sed ankoraŭ ne malaperis

krepusko: nehela lumo, kiun estigas la sunaj radioj resenditaj de la tera atmosfero post subiro de la suno kaj antaŭ ĝia leviĝo

diurno: = tagnokto, daŭro de 24 horoj.

SEMAJNO

periodo de sep tagoj, kalkulata ekde la meznokto inter dimanĉo kaj lundo: *lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato, dimanĉo* (kiun tagon de la semajno ni havas hodiaŭ?)

periodo de sep tagoj, kalkulata ekde ia tempopunkto

MONATO

ĉiu el 12 neegalaj partoj, en kiujn oni dividas la jaron, en landoj de romida civilizo.

januaro, februaro, marto, aprilo, majo, junio, julio, aŭgusto, septembro, oktobro, novembro, decembro.

— periodo de proksimume 29 tagoj, dum kiu la luno faras kompletan revoluson ĉirkaŭ la tero (la luna monato estas la bazo de la hebrea, araba kaj ĉina kalendaro.

SEZONOJ

ĉiu el la jar-kvar-onoj

vintro

(decembro, januaro, februaro);

printempo

(marto, aprilo, majo);

somero

(junio, julio, aŭgusto);

aŭtuno

(septembro, oktobro, novembro).

JARO

tempo-mezur-unuo, egala al la daŭro de unu kompleta rondiro de la tero ĉirkaŭ la suno

(egala al 365 tagoj 5 horoj kaj 48 minutoj kaj 23 sekundoj)

— same longa periodo,

komenciĝanta ian alian tagon (lerneja jaro, financa jaro ktp)

superjaro: - jaro, havanta 366 tagojn

centjaro(a): - havanta la aĝon de cent jaroj (centjarulo)


jarcento: cento da jaroj, numerita periodo ek de la naskojaro de Jesuo-Kristo, ekz.: la dekkvara jarcento; la deknaŭa jarcento...

analogan sencion havas aliaj vaste uzataj kunmetaĵoj:

kvaronjaro, duonjaro, unujara, unuajara, dekjara; miljara daŭrinta miljarojn (miljara imperio), multjara, plurjara, pasintjara,

epoko: jararo prezentanta apartan propran karakteron, ekz.: la epoko de mezaj jarcentoj (=Mezepoko), la renesansa epoko, la moderna epoko...

erao: Kronologia sistemo, laŭ kiu oni kalkulas la tempon ekde la aparta difinita tempopunkto, ekz.: la kristana erao..



Nia konstanta kunlaboranto kaj kara amiko el Londono *Bill Thorne* sendis al la redakcio sian tajposkripton "RIMARO, helpilo por verkisto de poemoj kaj kantoj". En la libro estas selektitaj vortoj laŭ iliaj finaĵoj, ĝuste tiel, kiel estas necesa por fari rimojn.

La redakcio alte taksis tian provon de s-ro *Thorne* kaj decidis konatigi legantaron de KOMENCANTO kun la verko, ĉar nia gazeto estas ne nur por komencantaj esperantistoj sed ankaŭ "por komencantaj aŭtoroj". Ni proponas al vi, karaj legantoj, kelkajn rim-kolektojn.

Kaj sam-okaze ni invitas vin uzi ilin kaj verki poemojn, preferinde gajajn kaj ŝercajn je ajna temo. Ni esperas, ke tiu tasko distros vin kaj ni kuŝe havos plezuron legi sur paĝoj de KOMENCANTO viajn verketojn.

Bill Thorne

RIMARO

Helpilo por verkisto
de poemoj aŭ kantoj

ESTO
atesto
besto
festo
gesto
vesto
nesto



Jen por ekzemplo:

En la ekzameno ateston
Ricevis besto
Aranĝis feston
Montras la ĝojon per gestoj
Pro ĝojo vestis novan veston
Kaj festas en sia nesto!

Gravas por ĉiu homo atesto
Ĉar homo ne estas besto
Bona atesto - por animo festo!
Invitas amikojn per gesto
Kaj en la luksa vesto
festenas en hejma nesto!

ALO

animalo
balo
bokalo
ĉevalo



finalo
kialo
detalo
generalo
batalo
halo
idealo
ĵurnalo
kvartalo
malo
medalo
metalo
skandalo
moralo

UPO

grupo
pupo
jupo
lupo
supo
ŝtupo
trupo

AMO

amo
dramo




flamo
gramo
hipopotamo
ornamo
reklamo
tramo
vigvamo
damo
famo
samo
balzamo
panoramo
teamo

ULO

angulo
fraŭlo
kulo
makulo
mulo
modulo
nebulo
nulo
okulo
postulo
regulo
konsulo
molekulo
spegulo
stimulo
tabulo

OPO

antilopo
episkopo
Eŭropo
mikroskopo



periskopo
teleskopo

Por via kaj nia distro!

En KOMENCANTO-2'98 aperis rakonto, kies vortoj komenciĝis je unu sama litero "M". Tiaj rakontoj estas amuzaj kaj fakte eĉ en la naciaj lingvoj estas malfacile verki tekston je iu konkreta temo, des pli komplikas tio por komencantoj en Esperanto. Tamen niaj legantoj bone plenumis la taskon kaj oni povis legi kelkajn provojn, eĉ poemojn je unu sama litero de Ludmila Leksina (urbo Sudĵa, Kurskaja regiono, Rusio) kaj Aleksandr Nasonov, (vilaĝo Ĉ-Nikolskoje, Lipecskaja obl., Rusio) kiu havis tiam nur 12 jarojn!

Unu el celoj de la redakcio de KOMENCANTO estas "instigi komencantojn al praktika uzo de la lingvo", do similaj amuzoj estas tre bona trejnado, pli interesa ol lernolibraj ekzercoj. Eĉ por spertaj esperantistoj ne estas simple verki tiajn. Per ĉi-suba rakonto ni invitas ĉiujn legantojn de KOMENCANTO partopreni konkurson kaj verki rakontojn kaj poemojn, kies vortoj komenciĝas je unu sama litero.



Oksana Burkina,
[SIBIRSKIJ, Altajskij kr., Rusio]

KONKURSO antista kaj kuirista


astela korto. Kreskas kverko. Komenciĝas krepusko. Knabo Kerol kaj knabino Kristino kantante kanzonojn kuraĝe konkuras. Knabino Kristino kantas karese kaj kviete kiel kolombino, knabo Kerol krias kvazaŭ kolera koko. Koncerto! Kamaradoj Kozin, Kuzin kaj Kulova konsideras kaj kontrolas komplikan konkurson kaj kantistajn kapablojn kaj kalkulas.

Knabino Kristino kuiras kukojn kun kakao. Knabo Kerol klopodas kuiri kaĉon kaj kafon. Kompetenta komisiono kontrolas kies kuirajoj konvenas kaj konkludas Kristinajn kukojn kiel konvenaj.

Knabo Klinton klinas kolon kaj kaŝas kapon. Komisiono kaj kamaradoj konsilas konsoli kaj kisi kompatindan knabon. Kristino kore kisas Kerolon kun kareso.


KRUCENIGMO

Tatjana Savina, [Pskovskaja ob., vilaĝo RUKAVEC, Ruslando]



Necesas diveni „iujn vortojn vertikale, tiam horizontale en la unua linio aperos vorto, signifanta *kuraciston de bestoj*

vertikale 1. tago de semajno 2. animalo, kies haŭto estas kovrita per pikiloj 3. kreskaĵo, kies foliojn oni fumigas 4. malĝusta respondo aŭ decido.. 5. malgranda saltanta besteto 6. likvaĵo, per kiu oni skribas 7. birda "hejmo" 8. insekto, saltanta kaj multe manĝanta 9. progreso malantaŭen 10. Ago de armeo, per kiu ĝi celas forpeli la malamikon kaj ĝin detru



Telefono, telefono...

Sekretario, tenante telefonan aŭskultilon:

- Sir, mi opinias, oni vin...
- Kial vi tiel pensas?
- Sir, en la telefono oni diras: "Saluton, ĉu estas vi, olda idioto?"

Smit sidas ĉe la matenmanĝo kaj trarigardas gazetojn. Subite li eksaltis. En la gazeto estas publikigita anonco pri lia morto. Li tuj telefonas al sia amiko:

- Halo, Bill, ĉu vi legis anoncon pri mia morto!
- Jes, — respondas Bill, — tamen, de kie vi telefonas?

Je la tria horo nokte sonoras telefono. Dormanta voĉo:

- Halo, bonvolu, tio estas telefono numero 223-32-23?
- Ĉu vi freneziĝis? Mi entute ne havas telefonon

- Halo. Bonvolu inviti al la telefono Vasjon.
- Vasja forestas, kion al li transdoni?
- Transdonu al li tri rublojn.

Ĉe la cirka direktoro sonoras telefono.

- Bonvolu diri, ĉu vi bezonas parolantan ĉevalon?
- La direktoro kolere ĵetas la aŭskultilon.

Denove telefonas...

- Tamen respondu, ĉu vi bezonas parolantan ĉevalon?
- Ĉesu huligani!

Denove telefonas...

- Aŭskultu. idioto, ĉu vi opinias, ke estas facile numerumi per hufo?

AFORISMOJ

Sergeo Kostromin,

[Krasnouralsk, Sverdlovskaja obl., Ruslando]

"Facilas elekti inter du malbonoj pli malgrandan. Multe pli malfacilas decidi, kiu el ili estas pli malgranda."

Esperantigis: **Stanislav Kacko,**

[Kurgan, Ruslando]

Mono estis inventita por tio, ke ni ĝuste sciu, kiom ni ŝuldas

(Kallen Ĥajtauer)

Venĝo satigas homon ne pli ol salita akvo

(Uolter Uekler)

Ne malbonigu pardonpetojn per klarigoj

(Kimberli Ĝonson)

Viktor Alikin, PERMO, Rusio

- Rigardu, kara, kian hodiaŭ mi havas fiŝkaptadon!
- La najbarino vidis, ke vi eniris la fiŝan vendejon
- Certe, parton de fiŝkaptado mi estis devigita vendi!

Parolas du fiŝistoj:

- La tutan tagon mi sidas ĉi tie kun fiŝhoko, sed nenia fiŝeto tiel kaj ne tuŝis la hoketon...
- Sed vi provu surmeti vermon sur la hoketon..



KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 3 rublojn aŭ 2 Internaciajn Respondukuponojn
Por pagintaj abonantoj de "x" - senpage

Claudio Delandre
43 ja., inĝeniero, tutmonde pri
poezio, naturo, biologio, lingvoj
Rua Viskonde de Taunay
385/103, BR-31525-020
Belo Horizonte-MG
BRAZILIO
elektronika poŝto: eppint@its.it

Jay Goos
44-jara agronomo
korespondi tutmonde
1710 South 6 Street,
Fargo, North Dakota,
58103
USA
elektronika poŝto: goos@pol.org

Alireza Valipuri
Gudarzi
22-ja studento pri interŝanĝo de
pm kaj monbiletoj kaj pri lingvoj
No 235, Bahrol-Olum Str,
IR-69166
BORUJERD,
IRANO

Jaroslav Liška
37-ja. skolto, interŝ. leterojn,
bildkartojn k poŝtmarkojn
tutmonde
Sidliŝte Svobodu 19/71
CZ-796 01,
Prostejov
ĈEĤIO

s-ino *Masumeh*
Valipuri Gudarzi
32-ja. licenciulo dez. kor. pri
lingvoj, literaturo, interŝ. poŝt-
markojn kaj monbiletojn
339 Safa Str.,
IR-69138, **BORUJERD**
IRANO

Juho Ilmari
Vattulainen
korespondi tutmonde
81160
Rompalla,
Rantakylantie 64
FINNLANDO

Yonier Cables Solis
kulturo, muziko, scienco, sporto,
kutimoj de diversaj landoj
Las Cruces de Purnio,
Unidad #:36-79
"La Cridla",
Holguin 80100
KUBO

Anieguoli
Vartaulevičute,
16 jara lernantino pri ĉiu
temo, interŝanĝi bk, pm
V.Kreves, 123-32
LT-3041, **KAŬNAS,**
LITOVIO

Julio Cezar Rodrigues
Martins
21ja., kun junulinoj pri ĉiuj temoj
R.Morcira Cezar, 339;
Paraiba do Sul-RJ.
BR-25850-000,
BRAZILIO

Nils Alvar Ekston
50 ja., simpla sveda amiko, mi estas tre
granda humoristo, mi ŝatas vojaĝojn,
korespondadon, fotojn.. kantojn,
ludojn..Mi estas eklezia pastro
Skaralid 780, SE-26070
Ljungbyhed,
SVEDIO
pilgrimsfolket@swipnet.se

Elena Kuznecova
18 jara studentino, dez.kor. kun
gestudentoj tutmonde pri geografio
kaj historio, interŝanĝi ideojn, bk kaj
fotojn
Veremceva, 151, BY-
211540 Gorodok,
Vitebskaja obl.,
BELORUSIO

Gregoro Richert
27ja., mi estas nova
esperantisto, ŝatas literaturon,
filmojn, poezion, muzikon kaj
Esperanton. Skribu al mi!
ul. Kwiatowa 27,
PL-84242 Luzino,
POLLANDO

M.Jove Marcel,
57 ja, juna pensiulo, dez.
kor. kun. samideanoj
222. Chemin de Pascal,
FR-83140, Six Fours les
Plages (VAR),
FRANCIO

Thomas Heberlein
38 jara, mi ŝatus korespondi
pri kristanaj temoj
Kuckuck 3,
De-31789
Hameln,
GERMANIO

Aneta Chytek
20 jara komencanto-fraŭlino
dez. kor. pri libroj, vojaĝoj,
bestoj
ul. Targowa 7 m 6,
PL-08-100, SIEDLICE,
POLLANDO

"*Verdu Urso*"
nova junulara E-klubo serĉas
amikojn !
Volodarskogo, 4
(MOKRSM)
MURMANSK, 183012,
RUSLANDO
mokrsm@murmansk.rosmail.com

Hubert Fillaudeau
56 jara restoracisto, mi havas 2 bakalaŭrecojn plus licencio. Mia hobbio estas
- ĉefe -vojaĝi, sed mi ege ŝatas legi. Mi interesiĝas pri astronomio, fotografio,
filatelo k.t.p. Mi vizitis pli ol cent landojn. Mi loĝas sur la insulo de Reunio
(apartenanta al Francio) en la Hinda Oceano apud Madagaskaro. Mi amas
babiladi kun geamikoj kaj multe skribi. Mi deziras korespondi tutmonde kaj
senpacience mi atendas vian respondon.
5 Rue des Champacs, Riviere du Mat les Hauts,
FR -97412 Bras Panon, (ile de la Reunion), **FRANCIO**

INTERNACIA KORESPONDA ADRESARO

Redaktas kaj eldonas : s-ro *R. J. Zverina.*

Publikigo de via adreso estas tute senpage. Skribu viajn nomon,
familinomon, kompletan adreson, interesojn, hobbiojn, naskiĝjaron
(laŭvole). Se ve deziras ricevi adresliston, bv sendi al ni 3 ĉeĥajn
markojn aŭ kvar kronoj. Aŭ 2 Internaciajn Respondukuponojn.
(PS: Ni serĉas landajn reprezentantojn en la tuta mondo!)

5. kvinta 26, CZ-460 01, LIBEREC, **ĈEĤIO**

35-persona Esperanto-Kurso en MURMANSK
Baldaŭ pretos korespondi. Skribu al ilia kursgviganto:
Aleksas Masjukas, 101-26 RU-183012, **MURMANSK, RUSLANDO**

